

Protokolo de la kunsidoj de la Komitato de ILEI

en Nyiregyhaza HU, 49-a Konferenco

Julio 2016

kvorumo 23 voĉoj

Dimanĉon, la 31an de julio

Prezidas : Mireille Grosjean (CH)

Kunsidas : Radojica Petrović (RS), Marc Cuffez (BE), Didier Janot (FR), Rob Moerbeek (NL), Sylvia Hämäläinen (FI), Ronold Glossop (US), William Harris (US), Alina Mozer (PL), Gong Xiaofeng (CN), Peggy Ley (DE), Zsófia Kóródy (GE), Isikawa Tiekō (JP), Mihai Trifoi (RO), Elena Nadikova (RU), Park Yongsung (KR), Duncan Charters (US), Jérôme Caré (FR), Ivan Eidt Colling (BR)

1. Bonvenigo

2. Akcepto de dokumentoj pri anstataŭigo de komitatoj

Komitatoj :

Jérôme Caré anstataŭas Michel Dechy. Francio

Zsófia Kóródy anstataŭas Chritof Krick. Germanio

Zsófia Kóródy anstataŭas Rudolf Fischer. Germanio

Isikawa Tiekō anstataŭas Hori Yasuo. Japanio

Sylvia Hämäläinen anstataŭas Paŭla Niinikorpi. Finnlando

Mireille Grosjean anstataŭas Jean-Thierry von Büren. Svislando

Nekomitatoj :

Peggy Ley anstataŭas Martin Ptasinski. Germanio

Alina Mozer anstataŭas Robert Kaminski. Pollando

Alina Mozer anstataŭas Magdalena Tatara. Pollando

3. Decido pri nombro de voĉoj por unu komitatano

Interkonsento por maksimume 3 voĉoj.

Tiel Mireille Grosjean, Sylvia Hämäläinen, Alina Mozer, Zsófia Kóródy, Isikawa Tiekō, Jérôme Caré havas laŭvice 2, 2, 2, 3, 2 kaj 2 voĉojn.

La 13 ceteraj ĉeestantoj havas po unu voĉon.

4. Informo pri la kvorumo.

Ne ankoraŭ alvenis Duncan Charters kaj Mihail Trifoi do entute estas 24 voĉoj. La kvorumo je 23 voĉoj estas trafita.

5. Definitivigo de la tagordo.

Akceptita je unanimeco

6. Elekto de protokolantoj

Didier Janot kaj Jérôme Caré estas proponataj.

Akceptita je unanimeco

7. Akcepto de la protokoloj en Oostende (videblaj en la retejo)

Por : 22

Kontraŭ : 0

Sin detenas : 2

Akceptita

8. Resumo kaj konfirmo de komitataj decidoj en Oostende 2015.

UNESKO. Ni atendu la baloton ĉe UN, kiu okazos antaŭ la fino de oktobro 2016, pro la fakto de la Ĝenerala Direktorino de UNESKO Irina Bokova estas kandidato.

9. Starigo de eventualaj dumkonferencaj komisionoj.

Komisiono ne necesa, sed ILEI bezonas raportetojn pri kelkaj prelegoj kiel tiuj pri universitata agado aŭ pri Esperanto-centroj. La gvidanto de ĉiu programero respondecas pri la elekto de la raportanto.

Por : 22

Kontraŭ : 0

Sin detenas : 2

Akceptita

10. Propono por Honora Membro : Dr Ilona Koutny

Por : 23

Kontraŭ : 0

Sin detenas : 1

Akceptita

11. Informoj pri la laboro de la estraro.

Kunsidoj. Projekto « Interkulturo » (RP). Kolekto de informoj pri Eo-centroj (EN)

(Alvenas Duncan Charters kaj Mihail Trifoi)

Estrarkunsido de ILEI en majo 2016 ĉe ties prezidanto. Bv legi IPR 16/2.

Kunsido de estraro en Nyíergyháza dum 2,5 tagoj post la konferenco.

Teknikaj problemoj por sekretario Émile Malanda kaj malpermeso ricevi vizon.

Nederlanda instanco Klant postulis de ILEI dokumentojn por malkaŝi kiel funkcias la asocio. Temas ĉefe pri kontrolo pri monlavado.

Debato pri estrarkunsidoj : ĉu endas pagi multe da mono por renkontiĝoj de estraranoj ? Ĉu Interreto ne sufiĉas ?

Tri proponoj :

"La estraro provu fizike kunveni kadre de internaciaj renkontiĝoj."

"La estraro privilegiu la uzon de teknikaj rimedoj por fari sian laboron kaj preni siajn decidojn."

"Ĉar la cirkonstancoj tre rapide ŝanĝiĝas la komitato rezignas pri rigida kadro kaj subtenas utiligon de fleksiĝemaj ebloj en la limoj de la buĝeto."

Por : 26

Kontraŭ : 0

Sin detenas : 0

Akceptitaj

Projekto "Interkulturo" : Estas eta provo en brazila lernejo.

Propono : anstataŭigi la vorton "konferenco" per "kongreso" ekde 2017, konservante la ĝisnunan nombradon.

Por : 22

Kontraŭ : 1

Sin detenas : 3

Akceptita

La komisiono pri statuto registru tiun ŝanĝon.

Propono : uzi la terminon "50a kongreso de ILEI" en Busano.

Por : 22

Kontraŭ : 2

Sin detenas : 1

Ne ĉeestas : 1

Akceptita

Informo : Elena Nadikova laboras pri ligiloj inter Esperanto-centroj, muzeoj, bibliotekoj.

Propono : La persono, kiu laboras pri Tago de Lernado en UK, Marija Belosevic, ankaŭ zorgu pri budo de ILEI en la kongresejo kaj dum la movada foiro kaj fariĝu komisiito.

Por : 24

Kontraŭ : 0

Sin detenas : 2

Akceptita

12. Informo pri eventualaj **kandidatiĝoj de novaj sekcioj** en Armenio, Barato, Tanzanio

Barato kaj Tanzanio sendis postulatajn dokumentojn. Armenio ne sendis.

Proponoj :

Barato estos la 40a landa sekcio de ILEI.

Por : 26

Kontraŭ : 0

Sin detenas : 0

Akceptita

Tanzanio estos la 41a landa sekcio de ILEI.

Por : 25

Kontraŭ : 0

Sin detenas : 0

Ne ĉeestas : 1

Akceptita

Lundon, la 1an de aŭgusto

Prezidas : Mireille Grosjean (CH)

Kunsidas : Marc Cuffez (BE), Didier Janot (FR), Rob Moerbeek (NL), Huang Yinbao (CN), Sylvia Hämäläinen (FI), Ronold Glossop (US), William Harris (US), Alina Mozer (PL), Gong Xiaofeng (CN), Peggy Ley (DE), Zsófia Kóródy (GE), Isikawa Tiekō (JP), Mihai Trifoi (RO), Elena Nadikova (RU), Park (KR), Jérôme Caré (FR), Ivan Eidt Colling (BR)

Mireille Grosjean, Sylvia Hämäläinen, Alina Mozer, Zsófia Kóródy, Isikawa Tiekō, Jérôme Caré havas laŭvice 2, 2, 2, 3, 2 kaj 2 voĉojn.

La 12 aliaj ĉeestantoj havas po unu voĉo.

Entute estas 25 voĉoj.

13. Vekado de la laborkomisionoj.

Ĉefaj informoj aŭ proponoj :

Ekzamena : ekzamenoj de ILEI-UEA okazas ĉefe ekster Eŭropo pro KER. En 2016 planitaj ekzamenoj en Togolando, Tanzanio kaj Irano.

Elekta : Zsófia Kóródy kaj Rob Moerbeek anstataŭas 2 ekskomitatanojn

Por : 23

Kontraŭ : 0

Sin detenas : 1

Ne ĉeestas : 1

Akceptita

Kontrola : plu funkcias

Lerneja : Ronald Glossop akceptas gvidi la komisionon.

Regulara : zorgas pri la statuto

Terminara : en 2015 aperis terminaro pri lernejoj kaj diplomoj. Ĝin oni uzu en IPR. Regulara komisionanoj nepre konsciu pri ĝi por la nova statuto.

Universitata : plu funkcias kun Ivan Colling kaj KIMURA Goro aldone.

Voĉdono por la venonta funkciado de la sep komisionoj

Por : 24

Kontraŭ : 0

Sin detenas : 0

Ne ĉeestas : 1

Akceptita

La Komitato subtenas la intencon de la estraro veki la komisionojn.

14. Informoj pri subvencioj a) por la Konferenco b) por la Instruista Trejnado unujara en Poznan, PL.

a) planita 30 monhelpoj je 100 eŭroj : ĉirkaŭ 10 personoj petis

b) planita 5 monhelpoj je 200 eŭroj

Diskuto : por venigi homojn al Busan, ĉu pli da mono por malpli da homoj ?

ILEI petos donacojn dum la fermo kaj ankaŭ en IPR.

15. Ceteraj diskutendaj punktoj kun la estraro

Venontjare prezoj por loĝado kaj manĝo nepre aperu pli frue, en marto.

16. Prezento kaj diskuto de la Jarraporto 2015 (inkluzive de la financa rezulto, la raporto de la Landaj Sekcioj (en la retejo) kaj la membrostatistiko)

Por tiu ĉi punkto ĉeestis Enikó Zengő Sereghy (HU) kun 2 voĉoj.

La prezento de la financa raporto okazos merkredon.

Aprobo de la jarraporto 2015 krom financa parto :

Por : 25

Kontraŭ : 0

Sin detenas : 1

Ne ĉeestas : 1

Aprobita

17. Voĉdono pri la financa raporto pri 2015.

Okazos merkredon.

18. Voĉdono pri la jarraporto pri 2015 kaj senŝarĝigo de la estraro.

Pri la jarraporto, jam farita en la punkto 16.

Pri la senŝarĝigo, okazos merkredon post la punkto 17.

19. La Jaro de la Lernanto, defio por ILEI

Laborgrupo jam ekzistas kaj enhavas 6 ILEI-komitatanojn kaj 1 estraron de UEA.

La 4 venontaj IPR prezentos po unu el la 4 ĉefaj sekcioj de ILEI.

Aperigo de tria eldono de Manlibro, papere kaj rete. La Komitato subtenas tiun agadon.

Filmkonkursoj a) pri gramatiko b) pri interkultura kontakto

20. Kreo de laborgrupo, kiu havos jaron por prepari statutmodifojn.

Komisiono regulara kaj Radojica Petrović.

21. Informoj pri la Konferenco 2017

Alvenos dum la vespera publika prezento.

22. Membrokartoj. Sekcioj povas krei membrokartojn.

Sekcioj povas uzi logotipon de ILEI, nepre ili informu la estraron.

Merkredon, la 3an de aŭgusto

Prezidas : Mireille Grosjean (CH)

Kunsidas : Marc Cuffez (BE), Didier Janot (FR), Rob Moerbeek (NL), Huang Yinbao (CN), Sylvia Hämäläinen (FI), Ronold Glossop (US), William Harris (US), Alina Mozer (PL), Gong Xiaofeng (CN), Peggy Ley (DE), Zsófia Kóródy (GE), Isikawa Tiekō (JP), Mihai Trifoi (RO), Jérôme Caré (FR), Ivan Eidt Colling (BR)

Mireille Grosjean, Sylvia Hämäläinen, Alina Mozer, Zsófia Kóródy, Isikawa Tiekō, Jérôme Caré havas laŭvice 2, 2, 2, 3, 2 kaj 2 voĉojn.

La 10 aliaj ĉeestantoj havas po unu voĉo.

Entute estas 23 voĉoj.

17) Prezento de la bilanco

Demandoj, diskuto.

Por : 23

Kontraŭ : 0

Sin detenas : 0

Aprobata

23. Opinioj de komitatanoj pri gravaj taskoj kaj strategioj por la nova periodo.

26. Ideoj kaj proponoj por la jaroj 2016-2018.

Temas pri evoluo de la retejoj de ILEI kaj dulingva papera dokumento por prezenti la ligan.

24. Buĝeto por la jaro 2017

Alvenas Lee Jungkee (KR) kaj Duncan Charter (US)

Propono : nova linio en elspezoj-tabelo : 500 € por la retejo de ILEI

Por : 24

Kontraŭ : 0

Sin detenas : 0

Ne ĉeestas : 1

Aprobata

Okaze de la voĉdono ene de la Komitato venis demando pri la faritaj modifoj. Jen la klarigoj donitaj de la kasisto :

« La gravaj diferencoj:

1. La originala buĝeto enhavis 1500 EUR por fakaj kaj aliaj kotizoj. Tio inkludis 1000 EUR por retaj plibonigoj kaj 500 EUR por ordinaraj fakaj kotizoj. La fina buĝeto enhavas 500 EUR por ordinaraj fakaj kotizoj kaj aparta ero por retaj plibonigoj de ilei.info.

2. La kosto de IPR presado kaj sendado malaltiĝis iomete, ĉar Ivo Verccammen nun presos la revuon, kaj pro la ekologio-amika papero, la pezo estos malgranda ol antaŭe.

3. Projektoj: La komitato aldonis monon por Afrika agado, Azia agado, latin-amerika agado, kaj ILEI lernejo: stipendio. Nuligis la monon por RITE, kaj aldonis monon por Jaro de la Lernanto.

4. En la enspezoj, ni aldonis 600 EUR por reta versio de Juna Amiko.

Amike, Vilcxjo Harris »

2016-10-24

Propono : Aperigo kaj prezo de reta versio de Juna Amiko : 11 € por A-landoj, 7 € por B-landoj

Por : 24

Kontraŭ : 0

Sin detenas : 0

Ne ĉeestas : 1

Aprobata

Propono : Nova papertipo por IPR : ekologia kaj malpli peza

Por : 23

Kontraŭ : 0

Sin detenas : 0

Ne ĉeestas : 2

Aprobata

Kelkaj ŝanĝoj en la buĝeto

Fina Akcepto :

Por : 23

Kontraŭ : 0

Sin detenas : 0

Ne ĉeestas : 2

Aprobata

Alvenas Radojica Petrović (RS)

18) **Senŝargigo de la estraro**

Estraranoj ne povas partopreni : 6

Por : 19

Kontraŭ : 0

Sin detenas : 0

Ne ĉeestas : 1

Aprobata

25. **Aŭskulto de raportoj de eventualaj dumkonferencaj komisionoj.**

Punkto forigita.

27.Diversaĵoj

Radjica Petrović proponas al la laborgrupo pri statuto, ke komitatanoj fariĝantoj estraranoj aŭtomate fariĝu nekomitatanoj. Tiel la komitato laboru sendepende de la estraro.

Protokolis Jérôme Caré kaj Didier Janot.

Aprobata de la estraro je 2016-09-10

Abprobata de la Komitato per 28 JESOJ : 2016-10-26